266

PRÉ[illegible] ALGER
[illegible] LEGAL

1re Année — 5 Novembre 1905 — N° 15

5 Centimes — 5 Centimoj

LA ALĜERIA STELO

L'ETOILE ALGÉRIENNE

Petit Organe de Propagande Espérantiste de l'Afrique du Nord

BI-MENSUEL ★★★ DUONMONATA

Prix de l'Abonnement annuel		Kosto de la Jara Abono	
Algérie, Tunisie.....	2 fr. »	Alĝerujo, Tunisujo.....	2 fr. »
France	2 fr. 50	Francujo	2 fr. 50
Etranger.....	3 fr. »	Eksterfrancaj landoj.....	3 fr. »

Les Annonces sont reçues à l'Administration du Journal, 57, rue d'Isly, ALGER.
Prix sur demande

DIRECTEUR-FONDATEUR
Barthélemy BALS
ADMINISTRATEUR
Louis LANDES

La Anoncoj estas ricevataj al la Administracio de la Jurnalo, 57, rue d'Isly, ALGER.
Prezoj laŭ peto

ESPERANTO EBLIGAS AMIKECON INTER PLEJ MALPROKSIMICITAJ HOMOJ

ESPERANTO KAJ LA VOJAĜANTOJ

Ni jam parolis pri la utileco de Esperanto, kaj enpresis diversajn korespondojn kaj artikoletojn detale klarigante, ke nia lingvo estas la plej bona ilo por unuigi la popolojn el diversaj landoj kaj ilin fariĝi fratoj. Kun Esperanto, landlimoj ne plu ekzistas, ĉar, kio faras la landlimojn ? Vere, estas nek la montoj, nek la maroj, kiuj malproksimigas la popolojn, sed la malsimilajn lingvoj.

Inter la nombrajn korespondojn, kiujn ĉiutage ni ricevas pri la amikecaj interŝanĝoj, estas leteroj de vojaĝantoj petante de ni informojn pri la landoj, kiujn ili deziras viziti. Tion sciiĝante, ili povas iri tiun landon, kaj sin okupi pri siaj aferoj kaj interparoli kun la tieuloj tiel bone, kiel ili parolus sian propran lingvon kun siaj samurbanoj.

Antaŭnelonge, nia kara amiko P. Stoĵev, el Trojan (Bulgarujo), sendis al ni sian fotografaĵon skribinte, sur la malantaŭa parto, la sekvantajn vortojn :

« Esperanto ebligas amikecon inter la plej malproksimigitaj homoj »

vortojn, kiujn ni estas fiera enpresi sub nia ĉeftitolo, ĉar ĉu tio ne estas bela pruvo de l' amikeco, kiu interligas la esperantistoj ? Malgraŭ ke ili loĝadas en malproksimigitaj landoj, ĉu ili ne estas fratoj ? Certe, ĉiuj niaj legantoj respondos : « Jes », kaj ili diros ke ni estas pravaj.

Hodiaŭ, ni havas la plezuregon ricevi de nia agema amiko kaj kunlaboranto, Grafo Albert Gallois, el Riolunato (Italujo), leteron en kiu li informas nin pri sia vojaĝo al Saint-Claude (Francujo).

Pensante ke ni estos agrablaj al ĉiuj niaj gelegantoj, plezure ni sciigas al ili parton de tiu aminda letero :

« ..... Pri aferoj, mi iris al Saint-Claude, kie mi estis afable ricevita de la ĉefmembroj de la urba esperantista grupo, kaj, speciale, de S-roj Félicien Caire, prezidanto, Maurice David, sekretario, Moraud, Ch. Meunier kaj lia edzino, kaj fraŭlino Eugénie Grillet, la aminda arkivistino.

« Je mia alveno, S-roj Caire kaj Meunier atendis min ĉe la stacidomo, kaj, post la vespermanĝo, mi ĉeestis en grupa kunveno ĉe la urbdomo, kie, ĝis la 11-an horon, ni Esperante parolis.

« Jaŭdon, ni kunvenis ĉe fraŭlino Grillet, kiu afable invitis nin trinki la teon. Ŝi montris al ni ĉiujn siajn esperantistajn dokumentojn, fotografaĵojn, poŝtkartojn, k t. p. En tiu okazo, S-ro David sendis du poŝtkartojn, la unua al S-ro Evrot, licea cenzuristo, el Bourg, kaj la dua al S-ro Jadeon ; ĉiuj la kunvenintoj subskribis tiujn kartojn. Fine, ni foriris je la noktomezo, esperante revidi nin en baldaŭa kaj pli longa kunveno, kiam mi reiros al St-Claude, la venonta somero..... »

Tiel oni vidas, ke dank' al Esperanto, kiu ajn povas trapasi ĉiujn landojn, trovante ĉie, ĉe la anoj de la urba grupo, membrojn de granda familio, gefratojn.

Ni ankoraŭ povus doni aliajn pruvojn pri la esperantista amikeco, sed, pro la malgrandeco de nia « Alĝeria Stelo » ni ne povas, bedaŭrinde, tion fari.

Tamen, oni povas ĵuĝi, ke ni estas pravaj dirante, en niaj antaŭaj numeroj, ke Esperanto ebligas fratecon inter la plej diversaj popoloj, kaj ni esperas, ke ĉiuj esperantistoj penados por propagandi, kiel eble plej multe ili povos, nian karan lingvon, laboradante tiel por tiu granda ideo, kaj honorigante nian grandan majstron, Doktoron Zamenhof.

BARTHÉLEMY BALS.

Ni ricevis la sekvantan artikoleton.

ESPERANTUJO

En la Bulonja kongreso ekvivis nova nacio, kies anoj vivas disege en diversaj landoj : nacio internacia. Kiel bele estus sè tiu ĉi nacio ankaŭ posedus landon, ian sanktejon, ĉu silentan, trankvilan arbareton, ĝardenon, parkon, ĉu ian pentrindan insulon meze de lago, kaj tio propraĵo de ĉiuj Esperantistoj estus. Centoj, miloj kaj eble unufoje milionoj da homoj pilgrimos ĉiujare en tiun ĉi teran paradizon, dankan signon kuŝigante sur la altaron homaran.

Fondu ni komitaton ; kolektu ni fundon kaj serĉu lokon eble en Svisujo, kiun oni jam nomis estonta koron de la homaro, aŭ en alia lando, kaj esperu ni, ke ekestos iutage sanktegejo por ĉiuj popoloj, en kiu nur estadas :

Espero, Paco, Amo ! Esper. 8.319.

Jes, tre bela afero por riĉaj esperantistoj, sed neebla por ni, manlaboristoj, preskaŭ ĉiuj malriĉuloj, kiuj ne povas aliri esperantujon. Tio estus bone por tiuj, kiuj posedas sufiĉe da mono por vojaĝi ; tio estas por tiuj, kiuj ne bezonas labori por vivi. Nia nacio al ni estas la tuta mondo laborema.

N. D. L. R.

EĤOJ

HONORA LEGIO.

Ni legis en « Lingvo Internacia », ke D-ro Zamenhof estas ordenita de la Prezidanto de la Franca Respubliko por la kruco de la Honora Legio (Legion d'Honneur). Tutkore, « La Alĝeria Stelo » sendas al la estro de Esperanto siajn malfierajn gratulojn pro la honoro, kiu montris al li la Prezidanto de la Franca Respubliko.

ESPERANTO KAJ LA LIBERPENSULOJ.

Laŭ « Lingvo Internacia », Esperanto estas akceptita kiel dezirinda helpa lingvo por la venontaj kongresoj, de la jusa Internacia Kongreso de Liberpensuloj en Parizo.

« LA ESTONTO ESTAS NIA ».

S-ro C. J. de la Failhe el Utreĥto, sciigas nin, ke en tiu urbo estas fondita la Holanda esperantista societo, sub nomo « La Estonto estas nia », celanta propagandadon por Esperanto en Holando kaj ĝiaj kolonioj per biblioteko, ĵbruŝuroj, paroladoj, k. c. La estraro estas : S-roj Dreves Uitterdyk, en Hilversum ; D. F. Romein, en Utreĥto, kaj Mr P. S. Gerlings en Iwolle, kiel korespondanto, donanta informojn al nesocietanoj, agos la subskribanto Oni klopodas fari organon de l' klubo el la « Holanda Pioniro » ĝis nune redakciata de S-ro Dreves Uitterdyk ; pri tio, ĝia sekvanta numero enhavos la decidon.

Ni tre dezirus ricevi interŝanĝe la « Holanda'n Pioniro'n » al kiu ni sendis a « Alĝeria Stelo » je l' komenco de ĝia elirado (N. D. L. R.).

EKSPOZICIO ESPERANTISTA.

Esperantistan ekspozicion okazos en Angulemo en fino de tiu jaro, kaj la organizonto, S'ro Bouquinet, petas ke oni sendu al li, 33, rue de l'ancienne Eglise St-Martin, Angulemo, ĉiujn dokumentojn pri Esperanto.

Ni deziras al tiu ekspozicio, kiel eble plej grandan sukceson.

ESPERO.

Amuzaĵoj

NAŬA PROBLEMO

Oni pagis 100 frankojn per 100 moneroj. Tiuj ĉi valoras, la unuaj 5 frankojn, la duaj 1 frankon kaj la triaj 5 centimojn.

Kiom da ĉia speco oni donis ?

DEKA PROBLEMO

Mi estas spaco inter montoj
Antaŭmetu prepozicion
Mi fariĝas hejma besto.

Ni donos la solvojn en nia venonta numero.

Fraŭlino JULIETTE H. (en Lagny).

DIAB'O KAJ LA BELA DĴAZIA'O

ARABA LEGENDO

(Daŭrigo)

III

La tri homoj eksaltis sur siajn ĉevalojn kaj direktiĝis sian duaron. Tuj alveninte ili sciiĝis pri la forrabo de la junulino, kaj senhalte reforiris al la rabinto.

Sekvante la postsignojn, baldaŭ ili akugis la Uled Hilal'ojn, kiuj persekutis la vendiston, tiuj ĉi kuregante estis disiĝintaj laŭ la rapidiro pli aŭ malpli granda de siaj ĉevaloj. Diab'o, kies ĉevalino estis tiel nelacigebla, kiel rapidirega baldaŭ ilin preteriĝis ĉiujn, kaj kiam ekkrepuskiĝis li ekvidis la Hebreon. Tuj, kiam li povis aŭdigi sian voĉon, li kriis al Dĵazia'o, kiu alturnis sian kapon por lin vidi :

Ho vi, kies okuloj estas similaj je tiuj de juna gazelo,
Kies vangoj brilas kiel suno,
Kies brakoj estas tiel blankaj, kiel blankegaj hindaj glavoj,
O, mia amatino, en ĉiuj miaj noktaj revadoj
Por kiu mia koro brulas pro amo,
Ho, Dĵazia'o, ne havu ian timon
Per miaj manoj, ni mortigos tiun Hebreon, filon de l' peko
Ni returnen iros nian tendaron.

De tiu momento, Diab'o estus povinta atingi la Hebreon, sed li pensis ke tiel agante, la aliaj persekutantoj alvenus preskaŭ samtempe kiel li kaj li ne povus kunesti sola kun Dĵazia'o. Do, li daŭrigis la persekuton, detenante sian ĉevalinon, ĉiam kuremantan malgraŭ la longega farita kurado.

Je la noktiĝo, komprenante ke li estas sufiĉe malproksime de siaj kunuloj por ke ili ne povu lin atingi kaj timante ke dank' al la nokto la rabisto fariĝos nevidebla ; per superega peno, li ekpuŝis antaŭen sian bonan ĉevalinon, atingis la Hebreon embarasatan de sia grandvalora ŝarĝo kaj lin traboris per sia lanco... .

Diab'o kaj Dĵazia'o, kiuj sekrete amis sin reciproke de ilia unua intervido, fine estis kunigataj, solaj en la profunda nokto, liberaj por konfesi sian amon unu al la alia, malproksime de ĝenaj aŭ malbonaj rigardoj.

Dĵazia'o, tute ekscitata de ilia kuniĝo en tiaj kondiĉoj, sentante ke sia amo pligrandiĝegas ankoraŭ por tiu, kiu ĵus liberigis ŝin el ŝia malŝatinda rabisto estis tuj malsupreniranta el sia ĉevalo por ĵeti sin inter la brakoj de sia liberiganto kaj amanto. Sed Diab'o, kvankam li tre deziru ankaŭ ŝin premi sur sia kora, ne forgesis la singardemon.

Por ne kompromiti tiun, kies honoro al li estis pli kara ol lia vivo, li sciis silentigi sian amon kaj siajn dezirojn. Li petis sian amatinon ke ŝi restu sur sia selo, post li kondukis la ĉevalojn per granda kurbiĝo por reeniri sian duaron ne rekontonte la rajdantojn.

Tiel, ambaŭ ili vojiris kune, dum ĉirkaŭe unu koro. Diab'o malŝparis al sia kunulino la plej karesaj vortoj, kaj tiu ĉi, la koro plenigita je amo povis nur respondi per ekĝemoj kaj nefinitaj vortoj. Ian momenton, iliaj ĉevaloj malproksimiĝantaj, Diab'o kliniĝis, ekkaptis la belulino je ŝia talio, ŝin altiris al li kaj kisis ŝin longe kaj amege. Tremetante ĝis funte de si mem kaj duonsvenigita, Dĵazia'o fine liberiĝis sin el lia premado. « Ho, Diab'o, ŝi murmuris per voĉo tiel malforta, kiel la Sahara'a venteto dum somera vespero, Diab'o, dolĉa objekto de miaj virgaj revadoj, vi kiun mi amas de tiel longatempe, nesciate de mia patrino, via amo estas pli dolĉa ol via brako estas forta ; mi apartenas al vi, mi estas via, sed vi estas tiel nobla, kiel kuraĝa kaj amema, vi kompatos pri mi. »

(Daŭrigota) A. BAISSAC.

KONTOROJ DE SKRIBMAŜINOJ
1, rue Colbert, ALGER
1, Place de la Bastille, ORAN

KOPIAĴOJ KAJ CIRKULEROJ
en Esperanto

Ĉiuj laboroj estas rapide kaj zorge plenumataj

ACÉTYLÈNE
Carbure de Calcium
T. GIRIAT & Cie
66, Rue Sadi-Carnot, 66.
ALGER-MUSTAPHA.
Téléphone

VOJAĜO ĈE OKCIDENTAFRIKAJ BORDOJ

Speciale Esperantigita por « Alĝeria Stelo »

UNUA PARTO

FORIRO EL MARSILIO ✣ ORANO ✣ LAS PALMAS ✣ DAKAR (Senegalo)
ALVENO AL KONAKRY (Franca Ginzo) ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣

— (Sekvo) —

Efektive, la maro ĉiam bela kaj trankvila, kaj la vetero tiel belega ekfaris kontentajn ĉiujn vojaĝantojn. Tiel, ĉiuj kunigitaj sur la bela spardeko, ĉe la postparto de l' vaporŝipo, ni pasis ĉarmajn tagojn, kaj idealajn vesperojn, kiujn ofte daŭris ĝis la noktomezo, dum ĝentilaj sinjorinoj regalis nin per agrabla muziko, kaj nemetiistaj sinjoroj aŭdigis ĝojajn kantetojn aŭ operajn ariojn ; ofte eĉ, finis la festo per ĝenerala danceto, kaj tiam la gedancantaj grupoj flirtigis malpeze sur la ferdeko, al la pala lunbrilo.

Ni ĉeestis ankoraŭ ĉe tre interesa kaj stranga amuzo ; efektive, tri tek Senegalaj soldatoj (Haŭsas) revenis Senegalon, post longa militiro ĉe Somalilando ; tiuj nigraj infanoj de l' Afriko, ĉiuvespere kunvenis sur antaŭa parto de l' ŝipo, kie ili, akompanitaj per flutoj, kiujn ili mem ekfaris, kantis ariojn kaj rekantaĵojn de l' Senegalo ; kompreneble tiuj arioj estas tute primitivaj kaj enhavas nur du solajn tonojn, ĉu « Ali-bai-be », ĉu « Setumanama ». Dum la kanto, unu da ili, meze al rondo, plenumis strangan dancon, aŭ pli ĝuste ekfaris saltojn kaj ridindegajn kurbiĝojn ; poste, iom post iom, li akcelis la movon, forte batante la ferdekon per la kalkano, kaj li finis per kapturna danco, vera epilepsia tornigado, ĝis li falis peze tute konsumita ; tiam, alia nigrulo anstataŭis la unuan, daŭrigante la dancon ; ĉiuj, unu post la alia, tiel dancis ĝis tuta kaj ĝenerala konsumiteco.

La 4-an de maj ., je la 9 an horon matene, ni trapasis la Tropikon Tiam, laŭ la kutimo, oni plenumis la famaĵn bapton Tiu ĉi ceremonio okazis inter la vojaĝantoj, kun la helpo de la maristoj de l' ŝipo, kaj ĝi estas kaŭzo por ridoj kaj tre amuzaj ŝercoj. Efektive, la vojaĝantoj, kiuj ne jam trapasis Tropikon, ne konas tiun kutimon ; tial, la malnovaj vojaĝantoj preparas la feston sekrete kaj nesciata el la estontaj nov-baptotaj. Ĉar mi jam plufoje trapasis Tropikon, dum miaj antaŭaj vojaĝoj, mi estis kun la malnovoj, kaj eĉ mi estis unu el ĉefaktoroj el la ceremonio. Mi havis fotografilon, ni do kombinis la sekvantan konspiron : dum la tagmanĝo, unu el la kunmanĝantoj petis min por fari grupon de ĉiuj la kunvojaĝantoj ; laŭ nia antaŭa akordo, mi tuj konsetis, kaj ĉiuj kune kun mi, supreniris fardekon por trovi pli bonan lokon por plenumi la grupon.

(Daŭrigota). GRAFO ALBERT GALLOIS,
Membro de la Grupo de Alĝero kaj de la Nordafriko

Legantoj ! Varbu al ni KVIN abonantojn kaj vi estos enskribota kiel proktektanta abonanto al la « Alĝeria Stelo ».

Ni ankoraŭ sendos sesan senpagan abonon al kiu ajn persono kies nomo kaj adreso estos senditaj al ni.

GRAFO GALLOIS, en Riolunato (provinco de Modena) ITALUJO, deziras ricevi malnovajn poŝtmarkojn el ĉiuj landoj. Li sendos, interŝange, ĉiujn italajn poŝtmarkojn malnovajn kaj nunajn.

L'INSIGNE espérantiste Etoile Verte d'Emile GASSE INTERNATIONAL est en vente dans nos bureaux, 57, rue d'Isly, Alger, au prix de **1** franc ; par poste recommandé, **1** fr. **15.**

Tous les Espérantistes doivent avoir l'**Etoile Verte.**

BONEGA OLIVOLEO EL " PROVENCE "
KAFOJ. - TEOJ. - ORANĜFLORAKVOJ. - PURA SAPO
Firmmarko : **L'Esperanto**
Petu prezarojn, specimenojn. — Speciala rabato al Esperantistoj por ĉiuj senperaj mendoj. — Agentoj akceptataj en ĉiuj landoj. — Skribu : A-te LANISSON, Salon (B.-du-Rhône) Franclando.
Por la Alĝeraj mendoj turnu vin al S-ro Louis LANDES, 57, rue d'Isly, Alger.

Le Gérant : MICHEL LLEDO. Alger. — Imp. J. TORRENT, 57, rue d'Isly.

Lettres accentuées de la Maison TURLOT, CHAIX et Cie, 128, rue de Rennes, Paris